


KOMENCANTO

revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



Kuraĝe verku!

Serova Nina [Berezovo, Rusio].

2005

Kiel Povilas Jegorovas, prezidanto de Litova E-Asocio iĝis esperantisto
alloga lando Litovio — verkoj de niaj legantoj — gramatiko amuze kaj
serioze — aforismoj — anekdotoj — diversaj ondoj el bunta mondo
ripozejo — korespondu!

1

Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian revuon

Argentino Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

Aŭstralio Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio Flandra Esperanto Ligo Frankrijkei 140, BE-2000, Antwerpen

Brazilo Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

Britio Eric Walker, Downham Reach Cottage, Nacton, Ipswich, IP10 0LA

Ĉeĥio Vladislav Hasala, A. Dvorská 1, CZ-696 62 Strážnice

Ĉinio Ĉina Esperanto-Ligo, PO Kesto 825, CN-100037, Beijing

~ S-ro Cui Jiayou, P.O. Kesto 448, Lixin 158120, Jixi, Heilongjiang

Danio Revuservo de Dana Esperanto-Asocio. Arne Casper, Bryggervangen 70, 4.tv. DK 2100 Kopenhago.

Estonio Virve Ernits, Villimaa 17 — 8, EE 93812, Kuresaare.

Finnlando Heta Kesala, Kalamiehenkuja 3 D 32, FI-04300, Tuusula

Francio Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

Germanio Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

Hispanio Pablo Vicente Valero, adv, Obispo Quesada n=BA14, 6D, ES-40006, Segovia.

Irano Irana Esperanto-Centro, P.O. Kesto 17765-184, TEHRAN

Italio Itala Esperanto-Federacio, Via Villorosi, 38, 20143, Milano.

Italio, Kroatio, Slovenio Višnja Branković

Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste

Irlando Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

Japanio Japana Esperanto-Instituto, JP-162-0042, Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3

Katalunio Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

Kubo Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, Havano

Litovio Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

Norvegio Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo

Nov-Zelando David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8004

Pollando Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

Portugallio Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto, N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa

Svedio SEF, Lisbet Andreasson, Sodra Rorum, Husarlyckeavagen 29, SE — 24294 Horby

Svislando Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

Usono Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

Redakcie

Kara legantoj!

Ni dankas ĉiujn, kiuj afable respondis al la demandoj de nia enketado, dissendita kune kun la 50-a numero de la revuo. La redakcio faris analizon de viaj respondoj kaj konsideros viajn opiniojn kaj rimarkojn.

Estas agrable konstati, ke multaj el niaj legantoj vigle reagis al materialoj publikigitaj sur paĝoj de la revuo. De nia flanko ni volas proponi, ke tiuj reagoj estu ne nur en formo de leteroj, sed tio povas esti verkoj daŭrigataj iun temon aŭ direkton; bildoj al plaĉaj verkoj, tradukoj aŭ ŝercoj; versoj, kiuj povas aperi en la kapo post tralego de iu originalaĵo aŭ tradukaĵo ktp. En tiu ĉi kajero aperis du similaj reagoj -- "La poploj" kiel daŭrigo de la temo pri Narturo, kaj "Ĉu moderna vivo estas logika?" kiel reho al ŝercoj kaj aforismoj sub la temo Logiko.

Multajn el vi la numero atingos jam printempe. Tial ni disponigis multe da spaco al verkoj, kies temo interplektiĝas kun temo Printempo. Ĉi direkte vi trovos kaj espereble ĝuos fajnajn poetikajn tradukojn de nia aŭtoro el Japanio Sibayama Zyun'iti, kolekton de priamaj versoj de diversaj aŭtoroj el diversaj landoj kaj mirandan kaj kortuŝan rakonton "Amo, stranga amo", tradukita el la portugala de nia nova aŭtoro el Brazilo Neide Barros Reĝo.

En la rubriko "Kiel tio komenciĝis" vin atendas interesa rakonto pri esperantistiĝo de prezidanto de Litova E-Asocio Povilas Jegorovas, kiuj ĉi-jare gastigos la 90-an UK.

Ni esperas, ke vi utile kaj plezure pasigos vian tempon ĉe tradiciaj rubrikoj pri gramatiko, anekdotoj, aforismoj kaj en ripozejo. Ni gratulas nian malnovan leganton el Usono s-ron J. Tilman Williams okaze de lia 80-jariĝo ĉe "Diversaj ondoj el bunta mondo!"

Agrablan legadon!

KOMENCANTO

2005 numero 6 // (51) // 6 numeroj jare

regule aperas ekde 1998

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavec

konstanta kunlaboranto Raja Kudrjavec

adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: komencanto@r66.ru

abontarifo por 2005:

internacia tarifo: 15 eŭroj

orienteuropa kaj latinamerika tarifo: 12 eŭroj;

konto ĉe UEA: vkud-a

rusia tarifo: 150 rusiaj rubloj poŝtmandate al:

Кудрявец Виктор Васильевич, 620041,

Екатеринбург, аб. яш. 132.

Povilas Jegorovas esperantistiĝis en 1970. En diversaj periodoj li estis prezidanto de Vilnusa junulara E-klubo "Juneco", sekretario de SEJM kaj estrarano de ASE.* en Sovetio, prezidanto de Litova Esperanto-Asocio, estrarano de UEA, membro de Societo Zamenhof. Partoprenis 19 Universalajn Kongresojn de Esperanto en diversaj landoj. Iniciatis kaj realigis akiron de Esperanto-Domo en Kaunas en iama domo de Aleksandro Zilbernik. Ĉeforganizanto de 7 BET-oj kaj de la 65-a kongreso de SAT en Kaunas. Redakciano de "Litova stelo", aŭtoro de kelkcento da artikoloj pri Esperanto en litova gazeto.*

Prezidanto de Loka Kongresa Komitato de la 90-a jubilea Universala Kongreso de Esperanto en 2005 en Vilnius.

Ĝenerale, Esperanto fariĝis maniero de mia vivo

Komenco estis tute hazarda. Estis septembro de 1970-a jaro. Al mia lernejo en negranda distrikta urbo MOLETAI, kie tiam mi loĝis kaj lernis, venis nova instruisto de litova lingvo kaj literaturo. Lia nomo estis Balys Matiukas. Post kelka tempo li anoncis tiel nomatan fakultativan kurson de Esperanto. Mi ĝis tiu tempo eĉ ne estis aŭdinta tiun vorton, nek komprenis, kion ĝi signifas. Do, mi iris tien pro simpla scivolemo. Kaj mi ne dirus, ke la afero al mi komence plaĉis. Ĉio iris tre monotone. Mi tamen kelkan tempon nekomprenis esencon de Esperanto. La afero multe pli evoluis, kiam post jaro dank al tiu instruisto mi partoprenis tutlitovian E-renkontiĝon en Panevezys de tiaspecaj lernantoj, kiuj lernas Esperanton en lernejoj fakultativoj. Tio min jam impresis, partoprenis ĉirkaŭ 200 personoj el multaj litovaj urboj, estis multaj famaj litovaj esperantistoj. Tie mi la unuan fojon ekaŭdis fluan paroladon en Esperanto. Ekvidis ankaŭ multajn librojn, ekaŭdis kantojn. Reveninte hejmen mi ricevis de la instruisto kelkajn adresojn de eksterlandaj esperantistoj kaj komencis skribi leterojn. Kaj kelkaj respondis. Precipe min impresis tre belaj leteroj en belaj kovertoj kaj kun tre belaj poŝtmarkoj el tiutempa Ĉeĥoslovakio. Tiu mia korespondanto estis Paŭlo Bartulec, bedaŭrinde, jam ne plu viva multajn jarojn. Liaj leteroj venadis tre ofte kaj tio plaĉis al mi, multaj aliaj lernantoj ĵaluzis min pri tio. Mi aŭskultis elsendojn de Pola Radio, komencis skribi al ĝi, partopreni en konkursoj de tiu radio. Samtempe mi komencis ricevi librojn de kelkaj litovaj perantoj.

lasene mi famiĝis, kiam mi tradukis el Esperanto al litova rakonton de vjetnama aŭtoro "La drinkejo de l mutulo" kaj publikigis ĝin en distrikta gazeto. Tamen sortoskua evento en mia Esperanto-vivo estis partopreno en

1972 en vica SEJT (Sovetia Esperantista Junulara Tendaro) apud Moskvo kaj samtempa Konferenco de SEJM-aktivuloj. Tie mi renkontiĝis kun la plej famaj sovetiaj esperantistoj - Boris Kolker, Viktoro Aroloviĉ, Anatolo Gonĉarov, Aristids Medinŝ, Semjon Podkaminer k.a. Mi tre atente aŭskultis ĉiujn dumkunvenoj kaj diskutojn, fine de la tendaro mi reale ekparolis Esperanton. Ĝis tiu momento mi praktike ne parolis, nur legis kaj skribis. Kaj kio la plej gravas, ke en tiu aranĝo mi finfine komprenis idean flankon de Esperantomovado. Tio por mi estis kaj nun estas multe pli grava, ol la lingvo mem. Kaj tie mi fariĝis jam plene konvinkita esperantisto. Ekde tiam Esperanto en mia vivo ludas la plej gravan rolon. Kaj la afero ekiris per multe pli granda rapideco. Ankoraŭ jaron mi aktivis en lernejo, sed jam havis intensajn kontaktojn kun aliaj litovaj kaj tutsovetiaj esperantistoj. En 1973 mi finis mezlernejon kaj eniris universitaton de Vilnius por studi juron.

La unua afero, kion mi faris post eniro, mi tuj vizitis tiean junularan E-klubon "Juneco". Post kelkaj monatoj oni elektis min prezidanto de la klubo. Tiam mi jam ĉiujare komencis partopreni SEJT-ojn kaj BET-ojn (Baltiajn Esperanto-Tendarojn, nun Tagojn). En 1976 dum vica SEJT kaj Konferenco de SEJM min oni jam elektis Sekretario de SEJM (Sovetia Esperantista Junulara Movado).



Ekde tiam mi okupis la plej diversajn postenojn en tiutempe neoficiala Esperanto-movado, faris la plej diversajn aferojn. Ĝenerale, Esperanto fariĝis maniero de mia vivo. Multon oni devis riski, ĉar tiutempe en Sovetio Esperantomovado estis nur tolerata, sed neniel instigata, helpata k.s. Ekzemple, en Litovio kune kun aliaj mi organizis nelaŭleĝan (samizdataŭ) presadon de preskaŭ ĉiuj Esperanto-presaĵoj en Sovetio (informiloj "Aktuale", almanako "Amikeco", informilo "Kurte", multajn apartajn eldonaĵojn, eĉ sufiĉe ampleksajn librojn). La vivo kaj E-agado estis tre intensa. Al mia poŝtkesto en studenta komunloĝejo en Vilnius ĉiutage venadis po kelkajn dekojn de leteroj (tiutempe ja ne ekzistis reto). Mi strebis agi kaj en oficiala nivelo (kontaktoj kun Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetiaj esperantistoj en Moskvo, poste kun Asocio de sovetiaj esperantistoj), kaj en neoficiala nivelo

(SEJM, diversaj aliaj formoj de kunlaboro, eldonadoj, kontaktoj kun eksterlandaj esperantistoj k.s.).

En 1978 mi finis juran fakultaton de Vilnusa universitato. Kiom mi estis engaĝiginta en Esperanto-movadon montris ankaŭ tiu fakto, ke eĉ mia diplomverko ne estis el proponitaj temoj, sed libere elektita kaj ligita kun Esperanto, ĝia temo estis "Internacia jura statuso de Universala Esperanto-Asocio".

Ankaŭ en 1978 okazis mia unua vojaĝo eksterlanden. Mi kun moskvano Dmitrij Perevalov (jam mortinta bedaŭrinde) estis la tuta sovetia delegacio en la 34-a IJK en Veliko Tirnovo kaj poste mi sukcesis superruzi moskvajn gvidantojn kaj resti ankaŭ en UK en Varna, kvankam laŭ origina projekto de moskvaj instancoj mi devis partopreni nur IJK. Interalie, tiu-ĉi mia vojaĝo estis la unua kaj la lasta, kiun plene pagis ŝtato. Poste mi ĉiam ĉion pagis mem.

Kompreneble, partopreno en tiuj kongresoj malfermis novan paĝon en mia Esperanto-vivo. Mi konatiĝis kun multaj esperantistoj-gravuloj el diversaj landoj, interalie, kun Simo Milojeviĉ, kun kiu poste dum multaj jaroj mi tre intense kunlaboris.

Ekde 1978 mi fariĝis advokato kaj ekloĝis kaj eklaboris en dua urbo de Litovio Kaŭnas kaj tie loĝas kaj laboras ĝis nun. Mi fariĝis eĉ multe pli aktiva, ol antaŭe. Oni povus multon rakonti, sed ĉi-tie estas nek spaco, nek ebleco. Mi povas nur diri, ke mi neniam bedaŭris, ke Esperanto-movado plene englutis min. Mi havis amason da aventuroj, ĉar mi ĝenerale ŝatas akcepti riskajn decidojn kaj foje provas aranĝi preskaŭ neeblajn aferojn. Kaj plejparte mi sukcesis. Kion signifas nur ŝipa veturado al Bergen! Kaj similaj aventuroj estis multe pli. Nun mi ne imagas mian vivon sen Esperanto. La lasta mia defio estas organizado de la 90-a jubilea Universala Kongreso de Esperanto en Vilnius fine de julio ĉijare.

* SEJM-Sovetia E-Jumulara Movado

* ASE - Asocio de Sovetiaj Esperantistoj



Bonvenigaj Vortoj de Prezidanto de Loka Kongresa Komitato de la 90-a Jubilea Universala Kongreso de Esperanto

23-30.07.05

Vilnius

Nome de Loka Kongresa Komitato de la 90-a jubilea Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos la 23-30-an de Julio, 2005 en ĉefurbo de Litovio Vilnius, mi havas honoron kaj respondecon bonvenigi Vin ĉiujn al Litovio por partopreni en tiu ĉefa ĉiujara internacia esperantista manifestacio. Tamen tiu ĉi kongreso ne estos vica – ĝi estos jubilea, ĉar la 90-a, kaj multe pli grave – ĝi okazos post 100 jaroj post la unua Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en 1905 en Boulogne-sur-Mer. Do, en Vilnius ni kune festos 100 jarojn de Universalaj Kongresoj, 100 jarojn de egalrajta kaj demokratia internacia komunikado, 100 jarojn de aktiva dialogo inter kulturoj. Gravas ankaŭ tio, ke sekvontjara Universala Kongreso okazos en la lando, kiu estas tiel forte ligita kun vivo kaj agado de la kreinto de Esperanto d-ro Ludoviko Zamenhof kaj kun ekesto de Esperanto ĝenerale kaj kie estas tradicie forta Esperantomovado. Litovio jam delonge meritas Universalan Kongreson, tamen pro historiaj kaŭzoj nur nun esperantistoj el ajna angulo de la mondo povos veni al siaj radikoj, al sia hejmo.

Litovio nur antaŭ 15 jaroj reaparis sur la mondmapo. Nun ĝi energie kaj vigle evoluas kaj kuraĝe eniras tutmondan komunumon. Tamen ĝi havas longan historion, antikvan lingvon, unikan kulturon, belegan naturon. Ĝia ĉefurbo Vilnius estas malnova kaj samtempe moderna multnacia kaj multkultura Eŭropa urbo, kiu famas pro sia unika malnova urboparto, pro nuna impeta kaj rapidega evoluo, pro toleremo al ĉiuj kulturoj, nacioj, lingvoj, pro gastamaj kaj bonvolemaj homoj. Nian ĉefurbon nun ofte oni nomas simbolo de nova Eŭropo.

Loka Kongresa Komitato kaj Litova Esperanto-Asocio faras multe jam nun kaj faros ĉion eblan estonte, ke la Universala Kongreso en Vilnius, kiel jubilea tutmonda esperantista forumo, estu ankaŭ eksterordinare grava, interesa, utila kaj memorinda evento por Vi ĉiuj. Ni kune helpe de Litovia Registaro, urba municipo de Vilnius kaj aliaj litovaj ŝtataj instancoj strebos, ke Vi ĝuu la urbon, la landon, la kongreson kaj ke Vi ekhavu dum la kongreso la plej belajn impresojn pri Via gastado en Litovio. Ni en Litovio konsideras Universalan Kongreson de Esperanto kiel eventon de nacia graveco kaj dediĉos ĉiujn niajn fortojn kaj kapablojn por sukcesigi ĝin. Ni deziras, ke ankaŭ laŭ kvanto de partoprenantoj tiu-ĉi kongreso estu rekorda. Por litovaj esperantistoj venonta Universala Kongreso estas kaŭzo ankaŭ por ĝenerale progresigi litovan Esperantomovadon ĉiudirekten.


Do, bonvenon al Vilnius, bonvenon al Litovio. Ni kune fortigunian solidarecon, progresigunian movadon, studu ĝiajn problemojn.

Povilas JEGOROVAS

Prezidanto de Loka Kongresa Komitato

Prezidanto de Litova Esperanto-Asocio

Alloga lando Litovio



Turo de Gedeminas en Vilnius

Legendo pri Vilnius

Historio de multaj antikvaj urboj komenciĝas de legendoj. Havas sian legendon ankaŭ Vilnius.

La legendo rakontas, ke sur tiu ĉi loko, kie nun situas Vilnius, komence de 14-a jarcento staris densaj arbaroj kun multaj bestoj kaj birdoj. Tiuj sovaĝaj arbaroj estis plej ŝatata ĉasluko de Princo Gedeminas, kiu regis la Grandan Princonlandon Litovian inter 1316 kaj 1341 j.

Foje dum ĉasado en tiuj arbaroj la Granda Princo laciĝis, sed tial, ke jam vesperiĝis kaj reveni en Trakaj estis malfrue, Gedeminas decidis noktumi en la arbaro. Gedeminas ordonis organizi tendaron apud loko, kie gaja rivereto Vilnja enfluas en la trankvilan riveron Hjaris. La ĉasistoj gaje diboĉis la tutan nokton, kaj fin-fine laciĝis kaj ekdormis. Kaj sonĝis al Gedeminas sonĝo: staras sur la alta monto lupo kaj bojas, kvazaŭ cent lupoj. La Granda Princo pafis per sagoj en la lupon, sed ĉiuj sagoj forsaltis de la besto: en la fera kiraso estis vestita malica besto.

Vekiĝis la Granda Princo kaj vokis sian sorĉiston Lidzejka klarigi al li la sonĝon. "Ho, Granda Princo! Via sonĝo estas volo de niaj Dioj", - diris la sorĉisto - "La fera lupu signifas kastelon, kiun vi devas konstrui sur la pinto de la monto ĉe la rivero *Vilnja*. Kaj ĝi estos forta, kaj nedetruibla, kiel tiu fera lupu. Kaj apud la fortikajo aperos baldaŭ granda urbo, kiu famos tra tuta mondo!"

La vortoj de Lidzejka plaĉis al Gedeminas, li premiis la sorĉiston, kaj reveninte hejmen ordonis konstrui sur la monto ĉe rivereto Vilnja kastelon, kaj apude konstrui urbon.

Tiel laŭ la legendo Gedeminas iniciatis la urbon kaj faris ĝin ĉefurbo de sia lando. La unuan skriban mencion pri Vilnius oni renkontas en 1323.

Hodiaŭ Vilnius estas ĉefurbo kaj la plej granda urbo de Litovio. Antikva Vilnius formiĝis inter la Supra kaj Malsupra Kasteloj, inter kiuj estis domoj kaj stratetoj de tiel nomata historia parto - la Malnova Urbo, kiu momente estas la plej granda Historia Parto inter la eŭropaj urboj (360 hektaroj).

La plej ĉefa vidindaĵo de Vilnius, ĝia simbolo estas Turo de Gedeminas, kiu bone konserviĝis ĉe ruinaj restaĵoj de la Supra Kastelo (14-15 jarcentoj). De tiu supro estas belega vido al la antikva urbo kun tegolaj tegmentoj, pluraj katedraloj, historiaj konstruaĵoj kaj interplektitaj malnovaj stratetoj de la Historia urboparto

Kelkaj informoj pri la lando de la 90-a Universala kongreso

Litovio estas lando en nord-oriento de Eŭropo. Areo - 65300 kvadrataj kilometroj. Najbaras kun Rusio, Latvio, Belorusio kaj laŭ 99 kilometroj kun Balta maro.


En Litovio oni kalkulas pli ol 3,7 milionoj da loĝantoj. La ĉefaj uzataj lingvoj estas litova, pola kaj rusa. En la lando dominas romkatolika religio, la litovoj estas homoj religiemaj, kvankam Litovio estis la plej lasta el eŭropaj landoj, kiu akceptis la kristanismon en 1387. En 2009 Litovio festos 1000-jariĝon de sia ekzisto.

Laŭ la specialaj kalkuloj de la Franca Nacia Geografia Instituto, ĝusta **Geografia Centro de Eŭropo** situas 20 kilometrojn norde de Vilniuso

Teritorio de la lando prezentas el si nealtan montetaran ebenajon, plej alta pinto de kiu estas monteto Juozapine - 292 metroj super la maro. Karaktera trajto de landa pejzaĝo estas restaĵoj de la antikvaj glaciperiodaj morenoj, kiuj viciĝas tra la tuta lando kaj ankaŭ sablaj dunoj apud mare kaj oriente.

Klimato estas milda. Kvietra beleco de litovia naturo altiras al la lando multajn ŝatantojn de trankvila ripozo, kaj ĝitaj maraj ripozejoj, dunoj, glaciaj lagoj kaj respekta rilato al la naturo mem kreas por la lando reputacion de unu el la plej bonaj lokoj de "verda" turismo

Litovoj estas vere trankvila kaj bonkora, tolerema kaj gastama popolo. Vizitu Litovion por vidi ĝian trankviligan belecon, ĝui pitoreskan naturon kaj konatiĝi kun bonaj homoj!



restaĵoj de malnova fortikajo en Kaunas

Poetikaj tradukoj
de Sibayama Zyun'iti [Kamakura, Japanio]

Vintra tago

iama kanto de elementa lernejo

Jam ne nebulas jen, prujnas en maten',
blanke do vestas sin ŝipoj de l' haven'.
Kante flugas birdoj fore sur la mar';
Ĝestas ankoraŭ en dormo la domar'.

Korvo kriadas jen alte sur branĉet',
kampo tritika nun estas sub hom-tret'.
Pasas tago vintra, vidas sin burĝon';
ho ĝi ekfloru ĉe ekster la sezon'!



Printempo

Ankoraŭ malvarma printempa ĝardeno.

Dafodilan
hiacintan
rozan
tulipan
pterokarpan
stelarian
krokusan
salikan
kapselan

-an-an-an-an-an-an-an
lokon, ĉiun lokon vizitas

bur- ĝon'
bur- ĝono -ĝon'
bur- ĝon'
bur- ĝon'

"la printempa aŭguro"

Sur la grundo neĝdegela mole
la postosignoj de l' getaĵoj* restas
de hieraŭ reirinta mia panjo
kiu amas tre hortikulturon.

*getaĵoj: japanaj lignoŝuoj

La vojo, per kiu venis la suba verko al la redakcio estas interesa kaj nekutima. La traduko estis sendita el Finnlando, sed la aŭtoro de la traduko loĝas en Rusio. Kial tio okazis? Impresita de aperinta en la pasintjara 6-a kajero de "K" traduko "Kalendaro de vintro", nia legantino el Finnlando Raita Pyhälä ekdeziris, ke temo de Naturo, ĉirkaŭanta nin homojn, temo de rilatoj inter ni kaj Naturo estu daŭrigota kaj sendis (post interkonsento) tiun ĉi belan tradukon de sia korespondamikino el Rusio. Por Goriĉenko Olga tio estas unua plezuro ekvidi sian verkon sur paĝoj de revuo.

La poploj

el la rusa esperantigis
Goriĉenko Olga [Kola, Rusio]

Pri ili oni ne povas ne pensi: ja ili tutan tempon estas ĉi tie, apude.

Eĉ se ilin oni ne vidas, oni aŭdas ilian bruon, balbutadon, susuron, depende de tio, kia estas la vento ekstere aŭ kiu sezono. Eĉ dum vintro tra duoblaj vitroj al mi aŭdiĝis seka, kvazaŭ frosta susuro, kvazaŭ ili mallauĉe frotas branĉon kontraŭ branĉo.

La poploj de ĉiuj flankoj ĉirkaŭas mian domon - la plej altan duetaĝan domon en la vilaĝo - sed ili estas eĉ pli altaj ol la grandega domo! Mi tuj apartigis ilin de ĉio, kio aperis ĉirkaŭ mi en la vilaĝo, tuj post kiam ni transloĝiĝis ĉi tien.

Sendube, la plej bone la poploj aspektas dum somero. Bruemaj, maltrankvilaj, per la speguletoj de siaj brilmalhelaj folioj ili dispecigas la sonon je miloj da pecetoj, brilantaj kiel fajreroj, kaj pleniĝas per ili de la pintoj ĝis la malsupraj branĉoj. Arboj forskuas tiujn fajrerojn en la herbojn kaj polvon apud siaj piedoj. Tial helaj, sunaj makuletoj tutan longan someran tagon trembrilas sub la arboj, jen aperante, jen malaperante denove.

Ankaŭ vintre la poploj estas ĉi tie, post la fenestro. Per nudaj ŝvelintaj artikoj kun ŝpinilformaj grandaj burĝonoj de rigidaj branĉoj ili apogas, ŝajne, ĉielon, la griz-blanketan pufĝintan ĉielon de la vintro. Dum sunaj tagoj ilin ornamas prujno. Kaj tiam densa bluo filtriĝas kaj filtriĝadas la tutan tagon tra la blanke maldiafana kaj pikebrila sukera reto de iliaj pintoj.

Ili estas la unuaj, kiuj sentas printempon. Okazas, ke jam en la lasta semajno de februaro, kiam matene la suno vekas vin, vi levas la kapon de la kuseno, ekrigardas tra la fenestro - kaj blua-ora ĉielo per la varmo torentas en

viajn okulojn! Alkutimiĝinte al la lumo, vi komprenas de kie venas la varmo kaj oro - de la poploj!

Kiel mole, kiel jam flekse balancas ili per siaj branĉoj, subite post la vintra senkolorco pleniĝintaj per flav-griza kaj verdeta koloroj, kaj la akrapintaj burĝonoj jam ne alpremiĝas al la branĉoj, ne penas kunfluiĝi kun ili, sed kuraĝe elstaras kaj, ŝajnas, jam iomete rondiĝis. Kaj vi subite (kvazaŭ konsternita de konjekto) per la tuta haŭto, per la tuta korpo, dolĉe sentas: la printempo alproksimiĝas! Printempo, printempo!

Kaj ŝajnas, ke vi jam sentas aromon de flava, popla rezino, la unuan vivan kaj klaran aromon de printempo, malgraŭ tio, ke dume ĉe la fenestroj estas duoblaj vitroj kaj neĝo ankoraŭ ne estas tuŝita de sunradioj kaj difektita per varmo.

Sed aŭtune la poploj volas kuri. Tion mi precize scias. Iun aŭtunan ventan nokton mi vidis, kiel furiozis ili, kiel balanciĝis, provante elŝiri sian trunkon - fortengan elefantan kruron el la tero, disŝiri la radikojn, postkuri la venton, la nubojn. U - u - u, kiel ili svingis per siaj pintoj, perdante la lastajn foliojn, kiel ili muĝis, kiel furioze ĵetadis post la vento grandajn branĉegojn - kvazaŭ negrandajn arbojn: se tia branĉo frapis mian fenestron, verŝajne elfalus la fenestrokadro.

Sed, certe, ia poploj forkunis nenien. Matene ili staris kvietaj, kvazaŭ subpremitaj per la malsukceso. Ĉirkaŭe senorde kuŝis iliaj vivaj branĉoj, ie kun folioj... "Ĉu jam estas fino?" ekpensis mi, rigardante al la branĉoj "Jam estas fino: reen ilin oni ne prenos."


Aŭtune ĉiuj sentas sin malkomforte. Ĉiuj deziras ien kuri. Sed la poploj ĉiam restas, ili gardas mian domon, respeguliĝante en ĝiaj altaj, puraj, malhelaj fenestroj, kiuj ofte pensigas pri arbaraj lagoj.

Mi delonge pensas pri la poploj. Ekde tiam, kiam ni ekloĝis en la malnova duetaĝa domo, restinta - oni diras - ankoraŭ de bienulo. Mi pensas ke la poploj ĉirkaŭantaj la domon de ĉiuj flankoj estas ne kiel la aliaj arboj: ja ili ne memstare kreskis, ilin plantis homoj. Kaj al mi ŝajnas, ke pro tio ili multon scias pri homoj, kaj ni scias pri poploj nur tion, kion ni vidas. Jen mi loĝas ĉi tie ekde antaŭnelonge, kion mi povus scii? Sed ili kreskas ĉi tie delonge kaj tre multon memoras. Kiu ilin plantis? Ĉu servantuloj de la bienulo, kies la domo vidis, kiel tie ĉi oni loĝis antaŭe, kiaj homoj vagadis, pri kio ili parolis...

Nuntempe ĉi tie loĝas ni, kaj ili rigardas nin, rememoras aliajn homojn, kaj scias ĉion pri ni. En tiun tempon, el kiu devenas la poploj kaj la domo, ni ja ne povas paŝi. Al ni restas nur konjekti, nur rigardi kaj aŭskulti: ĉu rakontos ion la maljunaj gravaj arboj? Ĉu ili malkovras la sekretojn? Sed ĝis nun ili rakontis al mi nur pri sezonoj, pri forto de vento kaj pri tio, kiel brilas la suno hodiaŭ: ju pli ĝoja estas la brilo de la folioj, des pli da sunradioj estas. Sed tamen ili devigas min pensi pri la mistero. Pri tio, ke ne ĉio estas tiel simpla ĉirkaŭe, kiel ni vidas.

La poploj ĉiam estis antaŭ miaj okuloj kaj, rigore leviĝis super mi, kvazaŭ en signo de atento, sugestis min: "Rigardu, aŭskultu, pensu!" Baldaŭ mi eksentis, komprenis, ke ili akceptis min kiel sian amikino. Okazas ja, ke aĝuloj amikas kun etuloj...

sian bildon sendis niaj legantoj kaj aŭtoroj el Germanio **Dorothea & Hans-Georg Kaiser** [Altenburg, Germanio]



Printempo estas tempo por vekigo de vintro kaj renoviĝo ne nur ĉirkaŭ ni en Naturo, sed estas ankaŭ vekigo aŭ akriĝo de multaj niaj sentoj. La plej mirinda el ili certe estas sento de Amo, kiu tiel aŭ aliel tuŝas nin ĉiujn kaj ni diversmaniere provas esprimi ĝin. Sur tiuj ĉi paĝoj ni kolektis kaj prezentas al vi priamajn verkojn de niaj aŭtoroj kaj legantoj.



Belousov Igorj [Engels, Rusio]

Mi sopiras pri Granda Amo,
Kaj sopiras pri Bela Virin',
Kiel bone trovi flamon
De la Amo en sia anim'...

Nekonatulo [N.Ĉelni, Rusio]

La printempo. Pensoj pri virinfemuroj,
Bruvekiĝas de dormado la naturo,
Papilio sidas sur la bajoneto,
Ruĝformiko provas ŝteli mitraleton.

Akcipitro serĉas en ĉiel' viktimon,
Paseretoj disflugiĝas de la timo,
Inter ŝtonoj la rivero suben glitas,
Kaj ne kredas mi, ke nokte mi militos.

Cezar

[Altenburg, Germanio]

Nia amo

(por Donjo)

Rokoj povas disrompi
Ŝipoj povas pere
Sed ke mi vin amas,
tion vi ne devas nei.

Fino

Inter ili estis silent'.
En ili ne restis cĉ sent'
pri kontent'.
La geo longe senvortis.
"La am' formortis",
flustras la vent'

El arma taglibro

Blankaj montoj ĉirkaŭ staras en Silento,
Malrapide gutas akvo de tegmento,
Kamarado por ĉiame la okulojn
Ne malfermos, sur ĉemizo – ruĝmakulo.

Knabo havis nek gepatrojn, nek gefratojn,
Kuŝas ie en malpur' pafaŭtomato,
Geparencoj ne priploros lian morton,
Povas esti mi ripetos tiun sorton...

Aŭtoro: *Rinaldo Brandão* [Brazilo]
 El la portugala tradukis: **Neide Barros Rêgo**
 [Rio de Janeiro, Brazilo]

Amo, stranga amo

Ŝi alvenis kapklinite, portante bukedon. Mi neniam ŝatis florojn, sed kun la tempo mi alkutimiĝis. Tempo faras ke ni alkutimiĝu al ĉio.

Ŝi restis kelkajn momentojn stare, ankoraŭ kapklinite kaj enprofundiĝinta en silenton tiom densan, ke ĝi permesis vidi, tra ĝia nigra kurteno ian timon, suspektaman timon pro io, timon eble kulpan, kiun la parfumo de la floroj vane klopodis kaŝi.

Ŝi fine sidiĝis, suspiris kaj levis la vizaĝon: ŝiaj okuloj estis plenaj je larmoj, kiuj iom post iom ŝanĝis ŝian vizaĝon kun vojoj similaj al riveroj, nigraj riveroj kiuj glitis tra la fluejo arida, disa, serpentuma.

Ŝiaj soifantaj lipoj atendis tiun mundon, kiu neniam venis; kiu ne sensoifigis tiun buŝon. La inundo de ŝiaj larmoj silentigis tempojn, sunojn, sentojn kaj vortojn enterigitajn sed vivantajn en neproduktema grundo. Nenio naskiĝis, neniu susuro, nur silento.

Ŝi prenis naztukon el la ĵaketa poŝo kaj sekigis siajn okulojn. Ŝi rigardis min ĉifoje tiel milde, ke mi opiniis ŝin pli bela ol tiam kiam ni disiĝis, antaŭ kvin jaroj.



Santi Elena Bullo [Mestre, Italio]

Finfine, ŝi ridetis.

Ŝi donis al mi bonegajn informojn pri la geknaboj. Rakontis al mi, ke Paŭleto jam frekventis sian prirevatan fakultaton de medicino kaj ke mia eta Lucinjo jam havis ĉion solvita por sia edziniĝo en la komenco de la jaro. Ŝi rakontis al mi pri multego da aferoj rilate al la geknaboj, sed mi ne povis bone aŭdi, ĉar ŝi parolis meze de larmoj, kiuj denove fontis el la okuloj de mia eterna amatino.

Meze de kaŝitaj singultoj, ŝi konfesis ke ŝi sentis mian mankon kaj blasfemis kontraŭ la vivo, premante inter la manoj la florojn, kiujn ŝi kunportis por mi.

Ŝi iom silentis kaj ploris kvazaŭ pro pento aŭ pro laco de tiu vivo vivata for de mi. Ŝi rakontis, ke ŝi sentis sin treege sola. Paŭleto, nun en la universitato, pasiĝis malmulte da tempo hejme; Lucinjo edziniĝos en la komenco de la jaro. Ŝi ne tolerus soleton.

Mi volis diri, ke mi ankaŭ sentis min tiel; estis maloftaj la vizitoj, kiujn mi ricevis: malmultaj amikoj, kelkaj familianoj, foje la infanoj, kaj ŝi, ĉiam ŝi.

Ankaŭ mi estis tute sola. Sed mi diris nenion. Mi lasis ke ŝi ploru iomete... iom pli ol alfoje, sed, kiam ŝi reordigis sin, ŝi denove havis tiun unikan rideton, kiun neniu alia virino sukcesus montri. La blankan haŭton, la belegajn okulojn. Denove mia amatino, mia eterna kaj neforgesebla amatino.

Ŝi rigardis min silente, kvazaŭ komplete. Mi volis riproĉi ŝin pro tio, sed ŝi estis pli rapida ol mia protesto kaj rekomencis paroli.

Ŝi demandis, ĉu mi memoras Markon. Kial mi ne memorus?

Li ĉiam vespermanĝis kun ni en semajnfinoj, la geknaboj adoris lin. Kompreneble, ke mi memoras lin. Li estis mia plej bona amiko, amiko de bilardo, de vesperfina biero en Leblon, laborkunulo...

Ili intencis amindumi.

Tie loĝis la kialo de tiu suspektinda kaj silenta konscienca riproĉo, de tiu kapklinita kulpo, kiun la parfumo de la floroj provis kaŝi. Tie troviĝis la doloro de tiu plorado.

Mi sentis ion, kio ĝenis min, eble ĵaluzon, eble timon perdi ŝin porĉiame.

Sed antaŭlonge ni disiĝis unu de la alia; ni ne plu suriras la saman vojon. Ni estas neeblaj unu por la alia. Ni jam estas disiĝintaj kiel frukto disiĝas de arbo kaj putras surgrunde.

Ŝi ankoraŭ floras, ankoraŭ fluas en ŝia trunko la suko, kiu eble povus revigligi min, revivigi min por pliaj printempoj, por pliaj floroj, por ke mi plu fruktu... Sed mi jam putriĝas senmova, senforta kaj sen espero iam ĝermi.

Estas necese akcepti ĉion. Ne estas malfacile akcepti. Fariĝi akceptata estas ĝenerale pli komplike. Estis jaroj kaj jaroj da kunvivado. Ne, ne da kunvivado: da komplikado. Jes, ni ĉiam estis komplicoj unu de la alia.

Estis necese akcepti.

Sed, kiam mi pensis diri al ŝi, ke mi eĉ sentas min feliĉa pro ŝi, pro niaj infanoj, pro ŝia vizito, pro ĉio, ŝi stariĝis. Kun okuloj ŝvelintaj pro tiom da plorado, kun la floroj ankoraŭ ĉemane, ŝi milde rigardis min, mallevis la nigran vualon sur sian belan vizaĝon, kaj per simpla gesto metis la florojn sur mian tombon kaj foriris.

Paĥomov Sergej [Kirov, Rusio]

Esperantas + Esperantene = Esperantajte

Antaŭ nelonge unu litovo rakontis al mi pri litovaj familinomoj dank' al mia scivolemo jenon:

En Litovio (la lando de la 90-a UK!) laŭ familinomo oni povas tuj, ne vidante homon, konkludi: ĉu estas viro, virino aŭ fraŭlino.

Ekzemple mia konato estis Petras Misilunas, ankaŭ lia filo havis familinomon Misilunas, sed lia edzino estis Misilune kaj ilia filino jam Misilunite. Unu familio kun tri familinomoj! Kiam la filino edziniĝos al sinjoro, ekzemple, Esperantas do ŝi iĝos Esperantene kaj jam ilia filino estos verŝajne Esperantajte. Prenu libron de Pasporta Servo kaj vi mem vidos:

Vilius Sidlauskas, Audrona Sidlauskiene, Ginta Sidlauskaite kaj aliajn familinomojn de afablaj litovaj gastigantoj.

Estas ankoraŭ interesa fakto, ke en Litovio ĉiu ne litova familinomo fin-fine litoviĝas kaj akiras finaĵojn -as, -us, -is. Mi suspektas ke patro aŭ avo de estimata Povilas Jegorovas, la Prezidanto de Litova E-Asocio estis simple Jegorov (ofta rusa familinomo), Malevičius estis Malevič, de Visockas estis Visockí(j) aŭ Wysocki (la pola), de Landsbergis estis Landsberg (la germana) ktp.



Ĥismatullin Albert [Troick, Rusio]

En ĉiu lando kaj lingvo estas siaj reguloj nekutimaj por aliaj sed ĝuste tio estas interesa por mi.

En juneco mi ludis tian ludon. Starante antaŭ la mapo de Sovetunio mi imagis kiel sonus mia familinomo, se mi loĝus en iu el 15 Sovetiaj respublikoj. Verŝajne tiel se estas sono "ĥ" en la lingvoj:

Paĥomovas en Litovio,
Paĥomenko en Ukrainio,
Paĥomovskij en Belorusio,
Paĥomjan en Armenio,
Paĥomŝvili en Kartvelio,
Paahoomi en Estonio, ktp.

Mihail Zadornov, profesia rusia humoristo iam rakontis jenon: "Mi naskiĝis en Rigo, Latvio, la najbara lando de Litovio kaj Rusio. En Rigo mia konato havis hundon kun la nomo *Ŝarik*, tre ofta kaj kutima hunda nomo por hundoj en Rusio. Mi ŝatis promeni kun la hundo kaj voki: "Ŝarik, Ŝarik!", - kaj tiu "respondis" hundece: vaŭ, vaŭ!

Post kiam Latvio apartiĝis de Sovetunio, la ĉefa lingvo de la lando iĝis la larva. Mi tiam loĝis en Moskvo, iufoje mi vizitis Rigon kaj foje ekiris promeni kun Ŝarik. Post iom da tempo mi vokis la hundon: "Ŝarik"! La hundeto ne reĥas. "Ŝarik!" Denove ne reagas. Kion fari? Kaj mi komprenis la aferon: "Ŝarikas!!" La hundo tuj ekbojis: "Vaŭs, vaŭs!"

esperantigis

Kudrjavceva Rafija [Jekaterinburg, Rusio]

Historio pri gramatiko

A. Inin

Interesa historio okazis kun mi pri personaj pronomoj.

Ĉu vi memoras: MI, CI, VI, LI, ŜI, NI, ILI, ĜI?

Do, MI sidas kaj laboras. Eniras nia nova ĉefo kaj interesiĝas:

— Nu, kiel CI ĉi tie laboras?

— Pardonu, ĉu VI al MI? — redemandas mi.

— Ĉu CI malbone aŭdas? — miras LI.

— Kaj kial CI? — ankaŭ miras MI. VI ja kun MI eĉ ne konatiĝis.

— Ha, ĜI min instruas konduti! — koleriĝis la ĉefo kaj foriris.

Kaj poste dum la ofickunsido LI starigas demandon pri kulturo de konduto.

— NI tiaĵojn ne permesos! — diras LI montrante al MI. — NI ne toleros malĝentilecon!

Do, ILI ĉiuj min insultis.

MI ege ĉagreniĝis.

Nur ŜI trankviligis MIN:

Ne ĉagreniĝu, kara, ja pravas VI. Ĉiu pronomo devas havi sian lokon!

Pri la stilo en miaj lastaj verkoj

Vi skribas, ke en miaj lastaj tradukitaj verkoj iufoje troviĝas frazoj malfacile kompreneblaj. Vi volis konvinki iun ne-Esperantiston pri la bonega komprenebleco de Esperanto, vi komencis traduki antaŭ li unu lokon el "La Rabistoj" kaj kun granda ĉagreno vi trovis frazon, kiun vi mem ne bone komprenis, kaj kiun kelkaj invititaj de vi Esperantistoj aŭ ankaŭ ne bone komprenis, aŭ tradukis malsame! Mi komprenis vian ĉagrenon, kaj, se ĝi estis kaŭzita de mia malbona traduko, mi petas vian pardonon; sed... permesu al mi diri, ke parte vi ankaŭ mem estis kulpa. Por fari nepreparite eksperimenton antaŭ ne-Esperantisto, vi devis elekti ne verkon klasikan kaj seriozan, sed ian verkon pli simplan. Se tiu aŭ alia frazo en verko de antaŭ longe mortinta klasikulo estas ne klare komprenebla, ĝi estas plej ofte ne la kulpo de la traduka lingvo, sed la kulpo de la aŭtoro mem.

Vi ja scias, ke la grandaj verkistoj, kiuj pli zorgas pri la *enhavo* de siaj verkoj, ol pri plena populareco de ilia *formo*, ofte bezonas *komentariojn*, ĉar eĉ membroj de ilia propra nacio ne ĉiam tute bone komprenas tiun aŭ alian frazon el iliaj verkoj. Tial ne miru, ke en miaj tradukoj de la klasikaj verkoj vi trovos iufoje lokon, kiu en la unu momento ŝajnos al vi ne tute klara.. Se mi volus doni nur tradukojn kun tute populara stilo, tiam mi devus: a) elekti por traduko nur verkojn popularajn; b) ĉiujn ne perfekte kompreneblajn aŭ facile tradukeblajn frazojn tute elfeti, aŭ traduki ilin libere laŭ mia plaĉo. Tia maniero de agado estus por mi tre oportuna kaj postulus por mi multe malpli da tempo, ol mia unua maniero de tradukado, kiu ofte devigas min longe mediti pri tiu aŭ alia esprimo aŭ frazo.

Sed kvankam la *ŝajna* valoro de miaj tradukoj tiam multe pli granda iĝus, ilia efektiva valoro multe malgranda iĝus, ĉar: 1) nia literaturo

konsistus tiam nur el verkoj malgravaj; 2) la tradukoj estus ne fidindaj kaj donus malĝustan kopion de la tradukita verko; 3) nia lingvo ne riĉiĝus kaj ne disvolviĝus. Precipe pri tiu ĉi tria punkto mi volus atentigi niajn verkistojn: estas tre dezirinde, ke ni ne evitu malfacilajn tradukojn, sed kontraŭe, ke ni ilin serĉu kaj venku, ĉar nur tiamaniere nia lingvo plene ellaboriĝos.

Naciajn idiotismojn, kiuj ne prezentas necesajn, ni devas kompreneble eviti kaj ni devas peni traduki ilian sencon en maniero plej logika kaj internacia; sed tiajn esprimojn, kiujn ĉiu lingvo nepre devas posedi, ni devas peni en tiu aŭ alia maniero nepre traduki, sed ne simple eviti ilin, pro timo, ke nia esprimo eble ne plaĉos al la legantoj aŭ ne ĉiuj ĝin tuj bone komprenos.

Unu el la plej ĉefaj taskoj de niaj verkistoj devas esti la *ellaborado* de la lingvo; tial, se ia esprimo, kiujn ne ĉiuj tuj komprenas (ekzemple "elrigardi", "subaĉeti" k.t.p.), ŝajnas al ili nebona, ili devas peni anstataŭigi ĝin per esprimo pli bona; sed se ili, por ne malbeligi sian stilon, simple evitos tiajn frazojn, ili faros al nia lingvo tre malbonan servon. Kompreneble en ĉi tio, kiel en ĉio alia, devas esti observata la deca mezuro. *Ne tro krude, ne tro multe por unu fojo!* Novaj esprimoj devas esti enkondukataj nur *iom post iom*, nerimarkeble. Krom tio ni devas memori, ke nia lingvo devas servi ne sole por dokumentoj kaj kontraktoj, sed ankaŭ por la *vivo*; tial ofte (precipe en vivaj dramaj dialogoj) pli bona estas frazo ne tute logika kaj ne perfekte preciza, sed mallonga kaj viva, ol frazo perfekte preciza, sed enuige peza kaj tro kabineta.



Pri idiotismoj en Esperanto

Mi esperas, ke iom post iom ĉiuj idiotismoj malaperos kaj cedos sian lokon al esprimoj tute logikaj kaj internaciaj. Tamen laŭ mia opinio ni devas fari tian anstataŭigadon nur en tia okazo, se ni povas tion fari tute oportune; sed en okazo, se ni por ia idiotismo ne trovos pli bonan esprimon pure logikan, tio ĉi ne devas nin ĉagreni; kaj la idiotismo povas tute oportune resti kiel "esperantismo", se ĝi nur estos komune akceptata.

Lingvo Internacia,
1905, p. 545

AF 😊 R I S M O J 😞

Kolektis
el diversaj
fontoj
kaj esperantigis
Aleksandro Ivanov
[Ozersk, Rusio]

kolektis kaj esperantigis
Kirejev Aleksandr [Tonnelnij, Rusio]

La tekniko fin-fine atingos tian
perfektecon, ke la homo povos vivi
sen si mem.

Stanislav Jeji Lec

*

Nenio tiel malvalorigas vian aŭton,
kiel nova aŭto de via najbaro.

NN

*

En Parizo mi manĝas nur en la re-
storacio en Ejfel-Turo. Ĝi estas la
sola loko, de kie tiu terura mon-
stro ne videblas.

U. Morris

*

Baleta estas opero por surduloj.

E. Krotkij

*

La plej bona rimedo kontraŭ sen-
dormemo estas dormo..

NN

*

Estas bone vizitadi amikojn kaj
parencojn, sed ne vivi kun ili.

T. Fuler

*

Homoj ne tiom volas esti riĉaj,
kiom volas esti pli riĉaj, ol aliaj.

NN

Belousov Igorj [Egels, Rusio]

Laboro sen preĝo – sklaveco, preĝo
sen laboro – almozeteco.

Konev Sergej [Kiseljovsk, Rusio]

Frazoj

Reklamo de kursoj de superrapida
lernado de fremdaj lingvoj similas
al "Herbalaj" – rapide, multekoste
kaj senutile.

*

Ne ekzistas "eksaj poetoj", kon-
traste al prezidentoj aŭ olimpikaj
ĉampionoj.

*

Punkto de reveno egalas al punkto
de nereveno.

kolektis kaj esperantigis
Yves Brusq [Douarnenez, Francio]

Absurda homo estas tiu, kiu
neniam ŝanĝiĝas.

A.M/ Barthelemy

*

Se vi bone serĉas, vi trovos.

Platono

*

Donu kaj vi ricevos.

Platono

*


Klareco ornamas profundajn
pensadojn

(el Vauvenargues)

*

La rideto, kiun vi donas, al vi
revenos.

XX



Kornjĥina Anna [Barnaul, Rusio]

Ĉu vi scias, ke..?

la ĉinaj saĝuloj
asertis, ke sur la dorso
dormas sanktaj homoj, sur
ventro – pekuloj, sur dek-
stra flanko – reĝoj, sur
maldekstra – saĝuloj.

*

4 el 5 longevivan-
toj, kiuj supervivis aĝon je
100 jaroj, estas virinoj?

*

en Moskvo loĝas
pli ol 100000 da familioj
kun familinomoj Ivanov?

*

ĉiun sekundon sur
la tero fulmas pli ol 200
fulmoj?


*

en Amsterdamo
estas 26 insuloj, en Peter-
burgo – 101, kaj en Vene-
cio – 118!

*

la japanaj esploris-
toj-sciencistoj sukcesis ek-
scii pli multe el la vivo de
hundoj kun helpo de vide-
okameraoj, kiujn oni alkro-
ĉas al kapoj de hundoj kaj
fiksas ĉiujn iliajn agojn.

Rezulte okazis ke
90% de tempo la hundoj
perdas por provi deŝiri de
siaj kapoj tiujn videokam-
eraojn. Dum la restantaj
10% ili forkuras de la
sciencistoj, kiuj kaptas ilin,
por ŝanĝi videokasedojn!



elektis kaj esperantigis
Abdullina Rozila [Iŝim, Rusio]

— Ekzistas amaso da knabinoj, kiuj ne volas edziniĝi.

— De kie vi scias?

— Mi mem al ili proponis.

*

Dunganto al la kandidato:

— Ĉu vi havas rekomendojn de la antaŭa via laborloko?

— Jes. Ili rekomendis al mi trovi alian laborlokon.

*

Novaĵoj:

— Hieraŭ planedo Tero kunpuŝiĝis kun kometo *Stimerka*. Ĉio vivanta sur la Tero pereis. Malprofito de la katastrofo egalas al 530 bilionoj da dolaroj.

*

Venas homo hejmen, enŝaltas televidilon, sidigas spekti novaĵojn kaj vidas: Usono militas, Francio amindumas, Japanio produktas, Turkio vendacas, Ĉinio faras infanojn. Ĉiuj ceteraj ripozas.

*

— Avinjo, kiom da klometroj estas ĝis la najbara vilaĝo?

— Ĉiam estis kvin kilometroj, sed poste venis termezuristoj kaj konstatis, ke estas sep. Rezulte nun necesas paŝi du superfluajn kilometrojn!

*

Vovoĉka al la patrino:

— Panjo, mi hodiaŭ la noblan aferon faris!

— Tre agrable, kaj kion vi faris?

— Andreo metis pinglon sur la seĝon de instruisto, sed mi lastsekunde, kiam la instruisto jam sidigis, sukcesis forigi la seĝon!

Nia legantino el Francio Martin Ginette trovas, ke en moderna vivo oni ofte renkontas strangaĵojn kaj absurdaĵojn, kiuj elvokas ne nur demandosignojn kaj dubojn, sed ankaŭ ridetojn...

Ĉu moderna vivo estas logika?

(esperntigita el franca revuo)

Martin Ginette [Saulxures/Moselotte, Francio]

Kial oni povas venigi picon al sia hejmo pli rapide ol ambulanco?

*

Kial la homoj mendas duoblan sandviĉon, grandajn telerojn da frititaj terpomoj kaj poste specialan sensukerigitan trinkaĵon?

*

Kial ni aĉetas la kolbasetojn en pakajoj po 10 kaj la bulketojn por akompani ilin en pakajoj po 8?

*

Kial la virinoj ne povas surmeti la nigran ŝminkon sur la okulharoj kun la buŝo fermita?

*

Kial la vorto "mallongigo" estas tiom longa?

*

Kial por haltigi "Windows" sur komputilo oni devas alklaki "Komenci"?

*

Kial en vendejoj la citron-suko estas farita per artefarita citrono kaj la likva sapo por lavi manĝilaron estas farita per veraj citronoj?

*

Kial ne ekzistas nutraĵo por katoj kun gusto de muso?

*

Kiam la nutraĵo por hundoj estas deklarita "nova kun plibonigita gusto", kiu gustumis ĝin?

*

Kial la "kamikazoj" surmetas kaskojn?

*

Kial oni seninfektigas la injektilon, kiu estas uzita por eŭtanazio?

*

Oni konas la "nigrajn skatolojn" por aviadilo. Ili estas taksataj "nedetruiblaĵ".


Kial la tuta aviadilo ne estas farita el la sama materialo?

*

Kial oni pli forte premas la klavojn de la televid-stirilo kiam la baterio estas preskaŭ mortinta?

*

Kial la ŝildoj "Ne marŝu sur la herbo-bedojn" estas plantitaj meze de ili?



Sadretdinova Naila [Voronjeĵ, Rusio]

Al usona amiko, kiu kreis Oazon de Esperanto

Nia plurjara fidela leganto s-ro Mayor J. Tilman Williams el Usono, Kalifornio, la 26-an de februaro festis sian 80-jaran jubileon. Dum multaj jaroj li propogandas nian lingvon kaj faris el sia hejmo "Oazon de Esperanto", kien li afable invitas ĉiujn dezirantojn.

Ni sendas al s-ro J. Tilman Williams niajn elkorajn gratulojn kaj deziras sanon, neelĉerpeblajn energojn kaj aktivecon por daŭrigi sian belan iniciaton kaj ĝenerale aktivan laboron por Esperanto!

la redakcio de "Komencanto"



Oazo de Esperanto

La plej Amikeca Loko en la Mondo. Mi estas civitano de la Universo.

Mia Hejmo Estas Via hejmo. La Universala Domo de Amo.

✉ 11241 Chapman Ave., Garden Grove, CA. 92840, USA ✉ oazodeesperanto@Juno.com

Somero en januaro

20-a Aŭstralia Esperanto-Somerkursaro en Adelaido



Inter la 9-a kaj 21-a de januaro Adelaido gastigis la 20-an Aŭstralian E-Somerkursaron.

Inter la pli ol 80 partoprenantoj estis gastoj ankaŭ el Francio kaj Japanio kaj ĝenerale multaj familioj kun infanoj. Tiuj interkonsentis fondi etan familian rondon kun propra reta babilejo cele al reciproka informado kaj instigo.

Katja Steele
[Adelaido, Aŭstraliao]



Surfote: *Penny Vos* kun siaj tri filinoj kaj nevo

Alikin Viktor [Permj, Rusio]

Vortenigmo

M A R A T O N O

1. Granda insulo en Hinda oceano
2. Varmejo (r)*
3. Festa lumigado (r)
4. Unuĝiba kamelo (r)
5. Kemia elemento kun atomnumero 86 (r)
6. Nea adverbo



r* - skribu nur radikon sen finajo "o"

Tri amikoj



Renkontiĝis tri amikoj:
kantisto Blankov, violonisto Nigrov kaj
pentristo Rufov.


— Estas bone, ke unu el ni estas blankharulo, alia nigrharulo kaj la tria havas rufajn harojn, sed neniu el ni havas tiun koloron de haroj, kiu koincidus kun niaj familinomoj — rimarkis la nigrharulo.

— Vi pravas, - diris Blankov.

Kiun koloron de haroj havas ĉiu el la amikoj?

Fiŝeto

Necesas transmeti 3 alumetojn,
por ke "Fiŝeto" naĝu en malan direkton.



Bill Thorne



RIMARO

OJO

fojo
ĝojo
rojo
vojo

IO

kriterio
letargio
linio
makaronio
medio
melankolio
misio
mumio
nacio
nocio
opinio
orgio
patrio
profesio
racio
religio
simio
stacio
strategio

OLO

apostolo
artikolo
bemolo
golo
kaserolo
kolo
kukolo
kupolo
muskolo
petrolo
pilolo
popolo
protokolo
rolo
skatolo
skolo
tavolo
titolo
tolo
violo
volo

Respondoj al la taskoj el "Komencanto"-6-2004

Krucenigmo "Neĝero" 1.kotono. 2.frosto. 3.georgo. 4.legato. 5.karoto. 6.radono. 7.otoman(o).
8.ampolo. 9.okuloj. 10.kakatu(o). 11.akcelo. 12.kolono.

Solvoj de la ŝercaj enigmoj: 1.Muŝo en submarŝipo 2.Trairi la straton 3.Tagmanĝon 4.Kun nula rapideco 5.Ai la alia flanko de ŝoseo

Anoncetoj Informoj Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj kaj 2 eŭrojn por ĉiuj ceteraj. Por abonantoj de "K" - senpage.

Mi estas 16 jara gimnaziano, komencanto. Intereso: muziko, kantado, libroj, lingvoj, tendaroj.

Sigita Prikockyte

Ramytes g. 3-3

Klovainiu p-t.

LT - 83204 Pakruoj raj.

Litovio

sigespige@myliu.m-1.lt

11-ja. knabo, denaska esperantisto, dez. kor. kun samaĝuloj(inoj) pri diversaj temoj. Int. komputeraĵoj kaj bestoj.

Demjašev Nikita

Naberejnie Chelni,

Novij gorod, p.k. 133,

423819, Tatario

Rusio

Mi estas 16 jara komencantino. Int: muziko, artaĵoj, piedirado, literaturo, naturo, manĝeblaj floroj. dez. kor. kun gejunuloj.

Mariza Monjo

Montrealo,

Kanado

rasy7@yahoo.ca

Mi estas 34 jara viro, progresanto. Int: legi, naĝi, kinofilmoj, fotografio. Mi serĉas 30-35 jarajn korespondantojn.

Kevin Robb

Oro-Marbordo, Kvinlando,

Aŭstralio

kevrob@bigpond.com

Mi estas 40-jara, deziras korespondi tutmonde pri diversaj temoj, ankaŭ pri munismatiko garantias respondon.

Belousov Igorj


74 - 13

Engels — 1

Saratovskaja obl.,

413101

Rusio



Všivceva Galja, [Miass, Rusio]

Mi estas agronoma inĝeniero, komencanto. Int: vojaĝoj, itala kulturo, brazila literaturo. Mi volas korespondi poŝte aŭ rete.

Antonio Fabiano Aguiar

Av. N.S. da

Penha, 200/301 - Praia de

Sta Helena, 29055-130

Vitoria-ES

Brazilo

antonioincra@hotmail.com

Mi estas 50-jara profesia tradukisto, amatora pianisto, bonnivela esperantisto. Int: pianoludado, klasika muziko, literaturo, sciencfikcio, verki esperante, bicikli, kristanismo. Mi deziras korespondi kun aliaj kristanaj plenkreskuloj kiuj partoprenas miajn interesojn. Kor. eblas papere aŭ rete.

Paul Hanks

36, impasse Jean Guehenno

42153 Riorges

Francio

phanks@wanadoo.fr

KOMENCANTO
2005
restas revuo
por vi,
ne forgesu
reaboni!

Mi estas 28 jara viro, komencanto. Mi estas teatra artisto. Mi laboras kiel edukisto en infana vilaĝo. Int: naturo, teatro, muziko, literaturo, komputiloj, aliaj kulturoj. Mi serĉas geamikojn, kiu volas interŝanĝi ideojn kaj opiniojn pri la vivo. Mi ĝoje korespondos ret-poŝte al paper-poŝte.

Fabieno Sansoit

Mar le Bas

58800 CERVON

Francio

fab.sansoit@free.fr

Mi estas 33-jara afrikano, laboristo, komencanto. Int: gimnastiko, muziko, kulturaj festoj, poemoj, tamtamumado, teatro, interŝanĝo de leteroj.

Iron Zion

Tübingerstr. 123,

72760,

Reutlingen,

Germanio

lionmanzion@yahoo.com

Mi mi estas 25-jara itala knabo. Mi ankoraŭ ne bone parolas Esperanton, ĉar mi ne havas kun kiu paroli. Mi volas korespondi kun 20-27 jaraj geknaboj. Int: alilandaj moroj, kutimoj kaj lingvoj; legado; muziko; arto;

Mirko Partescano

Siracusa

Italio

mirkirppu@libero.it

Mi estas 31 jara fraŭlino, E-komencanto, juristo. Mi ŝatas korespondi pri aliaj kulturoj por pratiki mian Esperanton. Int: muziko, kinon, aliaj landoj, fremdaj lingvoj, vojaĝi, legi, interŝanĝi poŝtmarkojn kaj leterojn.

Karina LAZARO

Argentino

karinalazaro@hotmail.com.ar

Mi estas 36 jara viro, progresanto. Mi studis pentradon. Int: naturo, vojaĝoj, montgrimado, vidi bonajn pejzaĝojn, renkonti bonajn homojn; grafiko, pentrado, muziko, retumado, libereco. Karaĝ situas 40 km okcidente de la ĉefurbo Tehran.

Mahmud Mirbozorgi

Irano

mahmud_mirbozorgi@yahoo.com

komencanto@r66.ru
http://Komencanto.narod.ru
viaj mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj!

